

Okdek jaroj de esperanta vivo, 14-a parto
Miĥail Solovjev, Leo Belmont kaj Emil Meier
Claude Gacond, 193-a radioprelego, 1967.06.21 & 1967.06.24

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Hodiaŭ finiĝas nia prelegaro pri la ekdisvastiĝo de nia lingvo. Ni prezentos al vi ankoraŭ tri figurojn, kiuj ludis iun rolon dum la fino de la rusa-germana periodo.

A.- Miĥail Solovjev, kiu venis al esperanto en 1889, redaktis por la gazeto *La Esperantisto* prozaĵojn kaj versaĵojn : anekdotoj, rakontoj kaj poemoj originalaj kaj tradukitaj.

Cl.- Tiu rusa juĝisto bone konsciis, ke lia arto ne konkurencas tiun de Zamenhof, Grabowski, Devjatnin aŭ Kofmann. Tamen li alportis sian kontribuon al la kreskigo de la esperanta literaturo. Miloĵ da esperantistoj sekvis lian ekzemplon, tradukante ŝatatajn librojn kaj provante ilin aperigi.

A.- Ŝajnas, ke esperanto estas instigilo al verkado. Nek Volapük, nek Idiom Neutral, la tiamaj konkurantoj al esperanto, konis tiun fenomenon kulture. Kontraŭe, en la organo *Progres* de la movado Idiom Neutral, ni povas legi, ke kreskado de la esperanta literaturo estas obstaklo al la plibonigo de tiu lingvo, ĉar aŭtoroj kaj tradukistoj fariĝas konservativaj pro financaj kaŭzoj.

Cl.- Aŭdu tiun argumentadon en la lingvo Idiom Neutral : « *Kreskasion de literatur de Esperanto es obstakl pro plubonifikasion de ist lingu, kaŭse autori e tradukatori deveni konservativ eks kausi finansik.* »

A.- Por la adeptoj de Idiom Neutral la eldono de libroj riskas malhelpi la evoluon de la lingvo, dum por la esperantistoj ĝuste la verkado evoluigas la lingvon.

Cl.- Literaturo certe kreas inercion. Tiun inercion timis la reformemuloj. Pro tio ili malhelpis sian lingvon Idiom Neutral fariĝi veturilo de skribita penso. Tiun inercion serĉas la esperantistoj. Por ili ju pli la lingvo stabiliĝos, des pli ĝi kapablos disvastiĝi kaj riĉiĝi vorte kaj stile. Riĉa literaturo estas garantio al lingva stabileco kaj progreso.

A.- Tiun stabilecon la reformemuloj konsideros kiel stagnadon. Kaj la manko de literaturo en la lingvo konkurantaj al esperanto estos konsiderata far la esperantistoj kiel pruvo de stagnado kaj fiasko.

Cl.- Du vidpunktoj kontraŭstaras. La sukceso de esperanto ŝajnas pravigi la planlingvan vidpunkton de la esperantistoj.

A.- Miĥail Solovjev, kiel miloj da esperantistoj, metis siajn kapablojn je la servo de la Lingvo Internacia de Doktoro Esperanto provante riĉigi ĝian literaturon. Li sentis sin malpli talenta ol la ceteraj, tamen li laboris.

Cl.- El tiu konscio plenumi minoran rolon naskiĝis originala poemeto, kiun vi povas trovi en la *Fundamenta Krestomatio*.

A.- Aŭdu tiun **plendon** :

Cl.- *Morto !... Ĉio jam finita !
Kie estas do feliĉo?
Kie gloro promesita?
Nia korpo nun – dediĉo
Al la vermoj, al putrado:
La animo bona, saĝa –
La ofer' de l' neestado!*

Okdek jaroj de esperanta vivo, 14-a parto
Miĥail Solovjev, Leo Belmont kaj Emil Meier
Claude Gacond, 193-a radioprelego, 1967.06.21 & 1967.06.24

*Ĝin severa kaj sovaĝa
La sendanka, senmemora,
En la tempo de vivado
la servema kaj fervora,
Senanima societo
Ekforĝesos nun por ĉiam,
Kaj eĉ ĝemo kaj larmeto
Memorigos min neniam!...*

A.- Tiu *Plendo* estas la plendo de miloj da samideanoj. Se ĝemo kaj larmeto memorigos ilin neniam, tamen ilia laboro vivigis lingvon.

Cl.- Unu el tiuj samideanoj nomiĝis Leopold Blumental. Pola hebreo, li skribis sub la pseŭdonomo Leo Belmont. Liaj artikoloj kaj prelegoj vaste diskonigis esperanton dum la rusa-germana periodo.

A.- Kuraĝa redaktoro de semajna literatura kaj politika organo redaktita en la pola, li estis kvinfoje enkarcerigita kaj unufoje ekzilita pro opini-konfliktoj kun la tiama registaro.

Cl.- Aŭtoro de centoj da libroj tiam ŝatataj de la pola publiko, li havis influon super la pola legantaro.

A.- En 1887 li jam salutis Zamenhofon. Lia letero, kiu finiĝis per la vortoj « *Vi venkos, sinjoro !* » famigis esperanton en Pollando.

Cl.- Poemo de Leo Belmont troviĝas en la *Esperanta Antologio* redaktita de William Auld.

A.- Ĝi titolas *Ŝekspir-adorantino*. Aŭdu ĝin :

Cl.- *De maten', knabino sidas
Kaj ŝekspiron studas... Van' !
Ne kombita via haro,
Ne lavita estas man'...

Do Ŝekspir' vin pli instruu :
Malgraŭ sia sort-malbon'
Lavas manojn Lady Makbet,
Kombas harojn Desdemon' !*

A.- Ni ne scias, ĉu en Pollando Leo Belmont aŭ Leopold Blumental estas nun ankoraŭ legata. Eble pola aŭdanto povos nin informi pri tio.

Cl.- Ni parolis pri kelkaj germanaj esperantistaj pioniroj : Leopold Einstein, Christian Schmidt, Trompeter. Ni hodiaŭ deziras ankoraŭ mencii Ludwig Emil Meier, kiu venis al esperanto en 1889 konklude al la rusa-germana periodo.

A.- Eksvolapukisto, kiel Leopold Einstein kaj la plimulto de la tiama germana esperantistaro, li restis fidela al la lingvo de Zamenhof post la voĉdono de 1894, kiam Christian Schmidt kun la Mondlingva Klubo en Nürnberg aliĝis al Idiom Neutral.

Cl.- Ludwig Emil Meier sin dediĉis al la esperantigo de germanaj ĉefverkoj kaj al la starigo de germana esperantista asocio. Al li ni ŝuldas interalie tradukon de la teatraĵo *Wilhelm Tell* de Schiller.

Okdek jaroj de esperanta vivo, 14-a parto
Miĥail Solovjev, Leo Belmont kaj Emil Meier
Claude Gacond, 193-a radioprelego, 1967.06.21 & 1967.06.24

A.- Vi aŭdis serion de prelegoj pri la unua periodo de esperanto, kiu kovras la jarojn 1887-1895. Post kelkaj monatoj ni daŭrigos nian studon pri la historio de nia movado. Sciu, ke tiujn prelegojn publikigas la gazeto *Sennaciulo* sub la rubriko *80 jaroj de esperanta vivo*.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-